

Pri la ŝancoj de Esperanto en la mondo

László Gados

Aperis en Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al Prof. István Szerdahelyi. Redaktis Ilona Koutny. Prodruck & Steleto, Poznań 2009. p. 143-156.

Enkonduka memorigo

Pluraj aŭtoroj priskribis la sorton de la propono ĉe la Ligo de Nacioj pri la Esperanto-instruado en publikaj lernejoj. La okazintaĵoj el la 1920aj jaroj unusence prezentas al ni, ke:

1. estis sufiĉe populara ideo, ke taŭga peranta lingvo necesus por la mondo;
2. Esperanto estus tute konvena por tiu rolo;
3. grandpotencaj interesoj baris, ke Esperanto estu instruota en publikaj lernejoj en diversaj landoj, kio estus la unua paŝo al la rolo de peranta lingvo.

La situacio ne tre ŝanĝiĝis dum pli ol okdek jaroj. Restis kaj ankoraŭ regas la ideoj kaj argumentoj kontraŭ Esperanto. La nescio pri Esperanto eble iĝis relative pli granda dum la pasinta tempo. Ĉu ĉio ĉi signifas, ke oni ne povas konsideri favoran progreson, kiu rilatas al la ŝanco de Esperanto? Eble la subaj faktoj donos kontentigan respondon.

Memorigo pri la ekzemplo de István Szerdahelyi

Por tio, ke Esperanto ricevu oficialan alprenon en (landa, landgrupa aŭ pli granda) socio ia oficiala jura normo, oficiala rezolucio certe bezonus, sed ĝi povas signifi nur komencan kondiĉon por la ekiro de kompleksa procezo. Por ke Esperanto funkcii kiel socie necesa kono, ĝi bezonas ricevi lokon en la lernejoj. La instruado necesigas lernilojn kaj instruistojn; por la formado de instruistoj necesas supera instruado, por kiu necesas scienca bazo. (Tuj ni rimarku: la pluformado ĉe certaj faktoroj ne nepre dependas de oficiala alpreno de Esperanto.) Krome oni devas estigi konvenajn kondiĉojn por la socia aplikado de la akiritaj lingvokapabloj de la homoj.

Konsidere la multflankan aktivecon kaj atingiĵojn de d-ro István Szerdahelyi, oni povas konstati, ke li tute konsciis pri la ĵus menciitaj interrilatoj. Estas klare konstateble, ke *lia konscia aktiveco direktiĝis antaŭ ĉio al la solvo de la oficiala socia alpreno de la lingvo Esperanto* (konsidere la donitajn cirkonstancojn kaj eblojn en Hungario). Lia multflanka aktiveco – kiun detale apreci ne mi estas

kompetenta – estis sukcesa, ekzemplodona, kaj kreis firman bazon por la estonta disvastigo de Esperanto.

Eŭropa Unio – ĉu la nova eblo?

Kiam estiĝis la Ligo de Nacioj la cirkonstancoj estis favoraj por prezenti proponon pri Esperanto. Ĉu poste estiĝis okazo konvena por proponi oficialan alprenon de Esperanto? Multajn jardekojn post la malsukceso de la tiama iniciato nova eblo en Eŭropo kreiĝis, kiam en la integriĝa procezo oni antaŭplanis la estigon de la Eŭropa Unio kaj ĝian plilarĝigon. Kial aperis la Eŭropa Unio kiel nova eblo por Esperanto? La ŝtatoj partoprenantaj en la integriĝo kun diversaj (oficialaj) lingvoj vole-nevole devas interkomunikadi. En la fazo de la nura ekonomia integriĝo la interkomunikada neceso tuŝis nur oficialajn instancojn, sed kiuj rajtas pretendi kunhelpon de interpretaj kaj tradukaj servoj. En la fazo de la Eŭropa Unio la interkomunikada bezono iom post iom tuŝas ankaŭ la civitanojn de la membroŝtatoj. Ĉio ĉi logike gvidas al la ideo: Esperanto povus favore plifaciligi la eŭropan komunikadon kaj malpliigi la problemojn.

Esperantistaj iniciatoj

Ĉe la Ligo de Nacioj la iniciatintoj de la propono estis oficialaj reprezentantoj de membroŝtatoj. Konsidere Eŭropon la situacio malsamas. En Eŭropo la unua iniciatinto estis grupo de eŭropaj esperantistoj, kiuj establis laborgrupon pri la eŭropa lingvodemando (Erasmus 1994)¹. Supozo estis, se pli novaj ŝtatoj membriĝos, sekve de la uzata interpretsistemo – traduki rekte de ĉiuj lingvoj al ĉiuj –, la interpretaj kaj tradukaj kostoj altiĝos ĝis neelteneblaj limoj. Por la evito de grandegaj kostoj estus bona, taŭga solvo la oficiala uzado de Esperanto. Post kiam evidentiĝis, ke la Eŭropa Unio surprenas kaj toleras la altajn kostojn, la esperantista propono reduktiĝis al la uzado de Esperanto en pontlingva rolo. Pli malfrue aperis ankaŭ la ideo pri lernejoj eksperimentoj. Alia grupo de esperantistoj informis anojn de la Eŭropa Parlamento pri Esperanto². Sekve de la sufiĉe regulaj informoj ne malmultaj eŭropuniaj parlamentanoj rekonis la taŭgecon de Esperanto, tamen ili ne havis rajton kaj eblon fari efikan paŝon por Esperanto. Krome, post baloto la deputitoj plejparte ŝanĝiĝis, do oni devis fari la informadon de la komenco. Kune kun la paso de tempo pli kaj pli da

esperantistaj demandoj kaj proponoj alvenis al la uniaj institucioj, ĉefe al la Komisiono.

EU-instituciaj reagoj

Kio estis ĝis nun la reagoj de la Eŭropa Komisiono? Se doni mallongan respondon: la komisionaj reagoj ĉiam estis rigide rifuzaj³. La respondoj ĉiam ripetis la saman: la koncepto de la Unio estas la multlingveco kaj la plurlingveco. Esenco de la multlingveco: ĉiu civitano ricevu la gravajn uniajn decidojn kaj informojn en la gepatra lingvo (supoze, ke ĝi estas oficiala lingvo). La plurlingveco signifas, ke la civitanoj de la Eŭropa Unio krom la gepatra lingvo scipovu almenaŭ du fremdajn lingvojn por ke ili ekkonu aliajn kulturojn. Estas evidente, ke la plurlingveco – se nur inter la alproprigitaj lingvoj ne estas ankaŭ komuna lingvo por ĉiu – nur eventuale certigas la kondiĉon por bonrezulta interkomunikado; krome la alproprigo de pluraj lingvoj signifas grandegan ŝarĝon por multaj homoj. Ĝenerala instruado de Esperanto kaj ĝia uzado en Eŭropa Unio kiel peranta lingvo estus pli racia kaj justa solvo, kiu apliko estus ankaŭ akordigebla kun la postulo pri la plurlingveco. (Rimarkinda: la celo en tiu ĉi koncepto akre distingiĝas de tiu celo, kiu direktiĝas al tio, ke Esperanto iĝu identeclingvo de Eŭropo.)

Kio kaŝiĝas en la fono de rifuzkialoj?

Post la daŭra, konsekvenca rifuzo kaj alvoko al la mult- kaj plurlingveco neeviteble aperas la demando: Kio estas en la fono de tiu proceduro? Kial la koncepto pri mult- kaj plurlingveco ekskludas la akcepton de Esperanto en la argumentado de uniaj instancoj, eĉ se ĝi estas kontraŭlogika? La respondoj povas doni konsilon al tio: sur kiuj pordoj oni frapu por Esperanto. Laŭ la ĝisnunaj spertoj tiaj pordoj estas troveblaj ne ĉe la Eŭropa Komisiono kaj ne ĉe la Eŭropa Parlamento. Ĉar kvankam la iniciatraĵo estas ĉe la Komisiono, sed estas neimageble, ke ĝi iniciatu tian leĝproponon, kies celo kaj enhavo antaŭe ne estus akordigitaj kun la registaraj starpunktoj kaj intencoj. Pri la komisionaj iniciatoj decidas ja la Konsilio de Ministroj kaj finfine la Eŭropa Konsilio, kiu konsistas el la ŝtatestroj kaj la registaranoj de la membroŝtatoj. Kiom da aŭ kiuj registaroj en la Eŭropa Unio montris jam emon al akcepto de Esperanto? Jes ja estas sciate, ke kelkaj politikistoj, inter ili registaranoj esprimis favoran opinion

pri Esperanto, tamen same favora registara iniciato aŭ faro ne estas konata pri la enkonduko de Esperanto en la instruadon.

La sinteno de la registaroj dependas de la tutmondiĝa efiko kaj ankaŭ de la politikaj karaktero kaj sinteno de la loĝantaro. En la mondekonomio specialaĵo estas la mult- kaj supernaciaj grandfirmaoj, kiuj kapablas influi ankaŭ registarojn, kaj super kiuj estas neniam socia kontrolo (Bakan 2004). Estas konate, ke ĉe tiaj grandfirmaoj la devige uzata lingvo ĝenerale estas la angla. Tiu fakto influas ŝtatajn lingvopolitikojn, en kiuj ricevas eminentan lokon la deviga instruado de la angla⁴. La kunplekto de la grandfirmaaj kaj registaraj interesoj tute ne favoras al Esperanto.

Progresigantoj de la eŭropa integriĝo ĉefe estas la membroŝtataj registaroj, helpataj de certaj politikaj, ekonomiaj, intelektularaj kaj ceteraj civitanaj fortoj⁵. Sed signifa kvoto de la loĝantaro – kiu ne tro malsamas en diversaj membroŝtatoj – timas la integriĝon, timas la malfortiĝon de la ŝtata sendependeco, aŭ simple estas neinteresata en la integriĝo. La registaroj ne povas tute flankenŝovi tiajn timojn. Ĉe ĉi tiu kvoto de la loĝantaro la mencio pri komuna dua lingvo povus signifi la plian striktigon de la eŭropa integriĝo al federacio. Pro tio la registaroj detenas sin de la publika subteno de ia komuna peranta lingvo, kvankam ili fakte helpas, ke la angla fariĝu tia. (Cetere ĉiu membroŝtato povas diri, ke la demando de la komuna lingvo estas problemo apartenanta al eŭropunia nivelo, kiu ĝin ne koncernas. Per tio la cirklo fermiĝas.)

Tamen, ĉar la registaroj ne povas tute flankenŝovi fortopleajn civitanajn postulojn, povas esti la ŝlosilo de situacioŝanĝo: konvinki vastajn civitanajn tavolojn pri la favoro de Esperanto. (Tiu ĉi tasko nepre pretendas pli novajn agadmetodojn.) Kaj nun ni alvenis al la konkludo de la Grin-raporto. La „scenaro «Esperanto» montriĝas la plej avantaĝa, [...]. La oftaj rifuzreagoj kontraŭ Esperanto malebligas la scenaron 3 ene de mallonga templimo. Aliflanke, oni povas rekomendi ĝin, en la kadro de longdaŭra strategio, kiun oni povas efektiviĝi ene de unu generacio. Du kondiĉoj tamen nepras por ĝia sukceso: unue grandega informkampanjo, por venki la antaŭjuĝon pri tiu lingvo – kaj kiuj ĝenerale baziĝas sur simpla ignoro – kaj helpi la evoluon de la pensmaniero; due, vera interŝtata kunordigado por la komuna efektiviĝo de tia scenaro.” (Grin 2005)

Rilate la unuan kondiĉon indas rimarki, ke ĝia efektivigo estas antaŭkondiĉo al la efektivigebleco de la dua. Plia rimarko: ĉiu faro kiu reduktas la nescion pri Esperanto estas utila kaj bezona, eĉ se la faro ne rezultigas la atingon de ia konkreta celo. Tamen, la efektivigo de la unua kondiĉo postulus amason de laŭprogramaj kaj kunordigataj agadoj en Eŭropo.

En siaj certaj partoj la Grin-raporto parolas ankaŭ pri tria kondiĉo. La tria rilatas al trejnado de lingvoinstruistoj por Esperanto. Rilate la solvon Grin citis eksplikon de Ottó Haszpra (Haszpra 2003). La trejnado de instruistoj, laŭ spertoj, estus solvebla en relative mallonga tempo.

Sinteno de esperantistaj agadintoj

Indas ĵeti rigardon ankaŭ al la alia flanko, al la inform- kaj iniciatagadoj de esperantistoj en Eŭropo. La suba trarigardo mallonge tuŝos tiajn agadojn, kiujn en la lasta jardeko de la pasinta jarcento prezentis ĉefe la Brusela Laborgrupo, Germain Pirlot kaj la de li kunordigita grupo (Pirlot-grupo), landaj Esperanto-Asocioj respektive la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU).

Tuŝante ankaŭ kritikendajn faktojn, temas ne pri kulpigo, nek opinioesprimo pri la vero de iu aŭ alia, sed temas pri malkovro de instruoj por la estonto.

Bazan problemon jam prilumis Mark Fettes, estrarano de UEA en letero (1994.02.02.) al la Agadkomitato por Federacia Eŭropa Lingvopolitiko: „La eŭropa agado rapide evoluas, dank’ al diversaj paralelaj streboj. Mi tamen konstatas, ke oni ankoraŭ povas apenaŭ paroli pri kunordigo: La Radikala Partio sekvas sian vojon, la landaj asocioj, EEU kaj Michael Cwik la siajn.”

La agado de la Brusela Laborgrupo direktiĝis al la Eŭropa Komisiono kaj parte al la Eŭropa Parlamento. Kelkaj anoj de la grupo penadis akiri respektive eluzi personajn interrilatojn ĉe tiuj institucioj. Laŭ la iniciato de Michael Cwik, en septembro 1993 ĉe la Eŭropa Parlamento okazis simpozio: „La komunika kaj lingva problemo en la Eŭropa Komunumo”. Tiu kuraĝiga komenco promesis daŭrigon, tamen ĝi prokrastiĝis jaro post jaro kaj fine neniiĝis. Pri la simpoziaj materialoj aperis volumo, kiun la organizantoj sendis al politikistoj kaj al fakuloj. La laborgrupo ellaboris projekton (Neighbour) por scienca lerneja eksperimento, kaj projekton (Relais) por eksperimento pri Esperanto kiel pontlingvo ĉe interpretservoj. Helpe de diverslandaj kunlaborantoj, la projektoj en multaj lingvoj ricevis tradukaĵojn, kiuj estis senditaj de Hans Erasmus al anoj kaj oficistoj de diversaj institucioj (Eŭropa Parlamento, Eŭropa Komisiono, Konsilio

de Eŭropo) kaj ankaŭ al fakuloj. Estas fakto, ke la du projektoj atingis multe da politikistoj, fakuloj kaj institucioj, kiuj el ili povus iomete informiĝi pri eŭropaj lingvaj demandoj kaj pri Esperanto. Tiasence la projektoj pruviĝis utilaj. Tamen ankaŭ tio estas fakto, ke tiuj projektoj neniam efektiviĝis.

Hans Erasmus konsekvence provis ricevi subtenon de landaj asocioj, kiuj konsistigis la Eŭropan Esperanto-Union (EEU). Li pretigis en 1995 kvinjaran planon: „Laborplano por la Eŭropa Esperanto-Unio 1995–2000.” Sed la landaj asocioj donis malmultan atenton kaj interesiĝon al tiu laborplano (cetere kiu estis mankhava, ĉar enhavis celojn, farendeĵojn, sed nenion pri konkretaj efektivigontoj, respondeculoj). Hans Erasmus planis la diskuton de la Laborplano okaze de la 2a kongreso de EEU en Parizo en 1995. Sed: „Nia laborgrupo multe bedaŭris ke en la kongresmapo mankis nia laborplano, kvankam kaj UEA kaj EEU petis al la organizantoj i.a. en letero de la 7a de aprilo disvastigi ĝin (kaj Mark Fettes petis tion persone dum restado en Parizo). Eĉ la plano ne estis menciita en la programo. Surloke kopii ĝin kune kun la ekspliko [...] de Hans Erasmus ankaŭ ne eblis bedaŭrinde” – konstatis li kritike post la kongreso. La situacio ne tro pliboniĝis en la posta tempo. En sia resuma raporto (03.05.1997.) Hans Erasmus hezitis jene: „Persone mi demandas al vi, ĉu ni daŭrigu. La helpo kaj kunlaboro estas tiom malmulta ke ni serioze konsideru, ĉu daŭrigo havos sencon.” Kaj en la sama jaro, en septembro li skribis en sia resumo: „Kiel mi ofte diris niaj aktivecoj nur liveros rezultojn se landaj asocioj kaj aliaj aktivuloj de la sendolisto kunlaboras kun la plano. Ĝis nun mi ne konstatas multe da aktivecoj laŭ nia laborplano. Eĉ en Stuttgart oni ne trovis tempon por diskuto pri la plano! Mi refoje adaptos la planon iomete por ke ni pridiskutu ĝin en Montpellier. Ne nur diskuto pri la plano mem sed precipe pri plenumo. Se tiam montriĝos ke neniu agis laŭ la plano, mi proponas ke ni finfine levigu nian laborgrupon.”

La Eŭropa Esperanto-Unio en la ekzamenata jardeko daŭre serĉis sed ne trovis siajn celojn kaj funkcirimedojn. „Kiu kongresu ĉiun duan jaron – la asocioj? EEU? Ambaŭ kune? Ĉu laborkunside, en malgranda grupo, ĉu grandnombre?” – demandis la Germana Esperanto-Asocio (Stocker 1995) antaŭ la pariza kongreso (1995). „Ni devus finfine klopodi difini kio estas EEU? Ĉu ĝi estas [...]” – vicigis la demandojn ankaŭ Renato Corsetti (Corsetti 1995) post la kongreso. „Ne heredinte ajnan informon pri la strategio de la organizo, eĉ ne skizan, kaj tial nur havante la celparagrafon de la statuto, mi vidas unu el miaj taskoj la evoluigon de strategio(j) por la entreprenotaj agadoj, por ke ĝi havu koherencon kaj

maksimuman efikon” skribis Jimmy Stryhn Meyer, prezidanto de EEU (Stryhn Meyer 1996). Post kelkaj monatoj li skribis: „...kaj mi povas vin informi, ke mi principe pretas rekandidatiĝi, sed mi ne daŭrigos sub cirkonstancoj similaj al la nunaj (Stryhn Meyer 1997).” El la 3a numero de la Eŭropa Bulteno (la 26a januaro 2000) antaŭ la 4a kongreso de EEU: „Ĉefa temo, kiun ni devos pridiskuti estas: kio estas EEU? kion ĝi celu?”

Germain Pirlot multajn jarojn faris kaj kunordigis informkampanjon, kiu direktiĝis al anoj de la Eŭropa Parlamento. Li liveris informojn al ili pri Esperanto kaj ties ebla rolo, krome li enketis ilian opinion pri Esperanto. Havante la permeson li publikigis la nomon kaj opinion de tiuj, kiuj en ia grado akceptus la konsideron de Esperanto, se pri la lingvopolitiko estus debato en la Eŭropa Parlamento. Germain Pirlot instigis ankaŭ la landajn asociojn en EU, por ke ili sammaniere informu la samlandanajn EP-deputitojn pri Esperanto. Ne nur instigis li la asociojn sed kunordigis la agadojn de tiuj, kiuj el aliaj landoj aliĝis al la informkampanjo. De ili li kolektis la nomojn de EP-anoj, kiuj reagis favore al la informoj; li kompilis kaj publikis sumigajn listojn kaj statistikojn, kiuj regule prezentis la atingiĝojn de la kampanjo.

La rolantoj de la „eŭropa agado” ne nur retenis sin de la sistema kunlaborado, sed reciproke ankaŭ kritikis unu la alian. Ekzemple letere protestis kontraŭ la agado de Germain Pirlot la prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio, Frank Stocker. „Mi pro tio volas peti vin ne plu serĉi kunlaborantojn por via projekto en Germanio. Ni jam prizorgas niajn EP-anojn laŭ nia maniero kaj estas vere malhelpo, se nun alvenas ĉe ili leteroj de alia flanko. Pleje gravas, ke la alparolado funkcias surbaze de konstanta rilato la ĉiam samaj personoj. Alikaze ili ekhavas la impreson de movado, en kiu ĉiuj faras sian propran laboron” (Stocker 1997). Rilate la konflikton opinio de Hans Erasmus: „La leteroj [tiuj de Frank Stocker kaj la respondo de Germain Pirlot] montras unuflanke ke Germain Pirlot listigis Eŭropajn Parlamentanojn, kiuj iamaniere esprimis sin ne negative pri Esperanto. Aliflanke ni konstatis ke laŭ cirkonstancoj la interpretado de tiuj esprimoj pri Esperanto estas tre diversaj. Kiam parlamentano vidas sian nomon sur iu listo, li/ŝi sentas sin malagraba aŭ eĉ kontraŭstaras la propran mencion. Ekzistas do kontrasto inter la bonaj intencoj de Germain Pirlot kaj la celita efikeco. Ni diskutu pri tiu agado. Precipe ni diskutu pri la propono de Frank Stocker »ne plu serĉi kunlaborantojn por via projekto (de Germain Pirlot) en

Germanio«. Unuflanke temas pri efikeco, aliflanke Eŭropaj Parlamentanoj apartenas al ĉiuj Eŭropaj civitanoj kaj ne laboras por Germanoj” (Erasmus 1997).

Germain Pirlot favoris la praktikon: „mi preferas konkrete agadi ol ade teoriumadi”. „Eĉ se mi neniel kontraŭas normalan pripensadon por starigi kaj kunordigi agadplanon, mi pli kaj pli opinias ke por vekigi **veran** intereson, esperanto **nepre** bezonas tri aĵojn: aplikado, aplikado aplikado!” (Pirlot 1995).

Iam estis Brusela Komunikadcentro

Kiuj de iom longe faras informadon kadre de la „eŭropa agado” supozeble konsentas kun la konstato, ke la funkciado de la „Brusela Komunikadcentro” kun profesia(j) ĵurnalisto(j) estis tre utila, kaj donis multan helpon ankaŭ por la landa informagado. Ĝi kolektis kaj liveris prilingvajn novaĵojn, prilumis – foje-foje sufiĉe akre – maloportunajn esperantistajn konceptojn kaj agojn, pretigis gazetarajn komunikojn ktp. Por la estonto estus inde kaj utile malkovri kaj resumi la lernigon de la komunikadcentra funkciado, kiu ĉesis pro manko de mono.

Jam ricevis emfazon, ke ĉiu faro estas utila, kiu reduktas la nescion pri Esperanto. Suplemente ni povas konstati, ke el la vidpunkto de la plua efiko, nome, en kiom vasta medio povas validiĝi la intelekta influo de iu, la ebloj de la homoj diferencas. Ĝenerale la influoradiuso de universitata profesoro certe estas pli granda ol tiu de pordisto ĉe fabriko. Sekve de tiu interrilato la diversaj konferencoj pri lingvopolitikaj demandoj nepre havas grandan signifon. Aliflanke estas certe, ke konferencoj, kunvenoj en si mem ne povas ekpreni, influigi amasojn de homoj.

Kion diri pri la ŝanco de Esperanto en la Eŭropa Unio?

La supre diritaj fundamentas, ke la esperantistajn provadojn ĉe la eŭropuniaj institucioj nun ni povas rigardi kiel sondadon, el kiu evidentiĝis, ke la ĉefan celpunkton oni devas serĉi alie. La du Grin-kondiĉoj prezentas ĝin. Supre estis videbla ankaŭ la forteco kaj malforteco de la eŭropaj esperantistaj agantoj. Pri la ŝanco de Esperanto en la Eŭropa Unio oni povas doni du respondojn depende de la rilato al la Grin-kondiĉoj kaj de tio, ĉu ekzistos fortoj por serioze kaj efike fari kampanjon por la realiĝo de tiuj kondiĉoj, aŭ tia rezultato – pro manko de taŭgaj fortoj kaj agadoj – nur restos en la revo de esperantistoj.

En la ĉi lasta kazo oni povas atendi ne tro signifan ŝanĝon kompare al la nuna stato. La aktiveco kaj ĝia efiko povos alterni inter certaj limoj, sed la efektiviĝo de la Grin-kondiĉoj certe restos nur revo. Kial? La sinteno de la landaj asocioj, kiun riproĉis Hans Erasmus rilate al la laborplano, esence estis natura. La destino de la landaj asocioj la plimulto de la esperantistaro prenas kiel organizan unuon en la diaspore ekzistanta „Esperanto-lando“, en kiu helpe de sia komuna lingvo oni povas multflanke esprimi sin kaj ĝui kunestadon, komunajn aktivecojn ktp. La kongresoj, festivaloj k.s. estas ĉefaj, naturaj kaj bezonaj scenejoj por la diaspore vivantaj esperantistoj, eĉ por la vivo de la lingvo. Sekve, la tasko de la landaj asocioj estas plurflankaj, kaj ili malpli estas taŭgaj partopreni projekton, kies plenumo rilatas al seriozaj postuloj. Krome ni ne forgesu la trafan opinion de Claude Piron:

„Multaj ĵurnalistoj, lingvistoj, politikistoj, intelektuloj imagas, ke ekzistas esperantista »movado«: homoj unuiĝintaj kun unu sama celo kaj agantaj por realigi ĝin. La realo estas tute alia. Temas fakte, ne pri movado, sed pri malkohera, tutmonde sed diaspore disigita »*individuaro*«, animata de tre malsamaj kaj ofte kontraŭdiraj sentoj kaj celoj. Iuj volas konservi Esperanton por si [...], konsciaj pri la avantaĝoj, kiujn havigas al ili interpopola komunikilo supera al la rivalaj sistemoj; aliaj faras ĉion por kiel eble plej disvastigi ĝin. Iuj volas okcidentigi la lingvon; aliaj, male, strebas al kiel eble plej neokcidenta formo de la lingvo. Multaj uzantoj de Esperanto vidas en ĝi precipe komfortan ilon praktikan, oportunan en eksterlandaj rilatoj; sed same multaj vidas en ĝi rimedon por realigi politikan kaj socian idealon. Por ankoraŭ alia kategorio temas ĉefe pri kampo de kultura agado, tre serioze konsiderata de iuj, uzata de aliaj kiel simpla ŝatokupo, kiun ili, nur kiel tian, ege ĝuas.“ (Piron 1994)

Ĉio ĉi estas bona kaj natura en la „kvazaŭ-lando“. Sed malkohera individuaro estas maltaŭga por finfari kampanjon konsidere la Grin-kondiĉojn. Tiu kampanjo bezonus koheran efektivigon. Tio apartenas jam al la dua respondo pri la ŝanco de Esperanto en la Eŭropa Unio.

Supozo pri la ebla elirvojo

Jarcentojn nombras la lukto aŭ batalo por la pli digna, pli justa homa vivo. La celoj kaj postuloj manifestiĝas en deklarioj pri homaj rajtoj. Vere temas pri batalo, ĉar ankaŭ la jam rekonitaj postuloj nur malrapide plenumiĝas en la

praktiko. Tre-tre multaj homoj suferas pro lingvouzaj devigoj, sed tiu fakto ne ricevas vastan publikecon. Oni jam konceptis en la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj la postulojn por forigi aŭ almenaŭ mildigi tiajn devigojn. Tiu ĉi deklaro estas tre grava por la lukto de homoj, kiuj vivas kiel ano de lingva minoritato, enmigrinto k. s. Sed tiu ĉi deklaro esence parolas nur pri la lingvaj rajtoj de la ĉiutage kunvivantaj lingvaj komunumoj kaj grupoj kaj ankaŭ ties anoj, kaj ĝi diras nenion pri la rajto de tiuj homoj, kiuj partoprenas en la internacia komunikado kaj trovas sin en maldigna, maljusta situacio pro lingvouzaj devigoj, aŭ pro kiuj ili/si ne povas partopreni por si deziratan aranĝon.

En la tutmondiĝa epoko estus aktuala disvolvi movadon por la pli justa, samdigna internacia komunikado, por kiu kondiĉo estas la uzado de tia lingvo, kiu ĝenerale ebligas neŭtralan lingvouzon.

Tia movado devus kolekti kaj prezenti al la publiko faktojn pri konkretaj kazoj maljustaj, maldignaj (ĉar la ĝenerala parolo pri maljusteco estas ne sufiĉe efika); sciigi homojn pri la homaj rajtoj, precipe pri la homa digno rilate al internacia komunikado; malkovri, ke ekzistas ilo por la efektive justa internacia komunikado ktp.

Por tio, ke homoj estu sufiĉe malfermitaj por enpreni la argumentojn de „grandega informkampanjo“, pri kiu parolas la Grin-kondiĉo, estas antaŭkondiĉo, ke ili estu en la konscio de la maljusteco kaj malaprobu ĝin. Ĉar nesufiĉas nur vidi la maljustecon kaj rezignacie akcepti ĝin. El tio sekvas, ke sukcese finfari tian informkampanjon estas tre malfacila tasko, kiu bezonas kompetentecon.

Konsidere la supre diritan, por la efektivigo de la grandega kampanjo estus necese establi en ia formo memstaran organizon en (finfine ĉiuj) membroŝtatoj; tian organizon, kies funkciado baziĝu sur zorge difinitaj celoj, taŭge pripensitaj principoj, realaj laborplanoj, efikaj labormetodoj ktp.

En kiu organizo estus anoj, nur kiuj akceptas la celojn, principojn ktp., kaj ageme penadus por la efektivigo de la celoj. En la organizo kompreneble tute ne povus manki esperantistoj, sed nepre necesus inter ĝiaj anoj ankaŭ aliaj personoj, kun kiuj la kompetenteco de la organizo estus pli kompleta. Kompreneble la landaj Esperanto-asocioj kaj homrajtaj organizoj estus naturaj kunlaborantoj de tiu organizo.

Kaze de estiĝo kaj funkciado de la supre elpensita(j) organizo(j) la ŝanco de Esperanto en la Eŭropa Unio estus signife pli bona ol se ĝi ne okazus.

Temas pri longtempa farendaĵo kaj grandega defio, kiu unuavice devus tuŝi junajn generaciojn. Ĉu en tiuj generacioj estas/estos aro de personoj, kiuj volos kaj kapablos preni sur sin la grandan taskon? La aŭtoro ne scias, lia tasko finiĝas per la prezento de la elekteblaj solvoj. Sed li scias, ke en la historio ĉiam estis kapablaj personoj, kiujn defioj stimulis al grandaj laborproduktoj.

Pri la novaj ebloj de la Esperanto-instruado

En la „individuara” mondo de esperantistoj – konekse kun la rapidega evoluo de la informadepokaj teknikoj, teknologioj – en la lastaj jardekoj okazis tre ĝojiga progreso. La komputiloj donas vastan eblon por la intelekta, eĉ ankaŭ arta kreado, kaj la kreaĵojn pludoni al diversaj datumportiloj. Saltrape plivastiĝas la ebloj, se la komputilo kontaktiĝas al la interreto. Interrete oni nuntempe povas akiri ne nur tekstojn, sed ankaŭ bildojn, filmojn; oni povas en rekta kontakto ŝanĝi pensojn skribe kaj voĉe, kaj ankaŭ reciproke vidi unu la alian (krome, krei fikcian mondon kaj vivi en ĝi). Ĉio ĉi signifas, ke iasence malaltiĝas la malavantaĝo, kiu fontas el la diaspore disigiteco de esperantistoj. Tio estas grava progreso por ili.

Ekzamenante la ŝanĝojn el la vidpunkto, ke ili kiel influas la disvastigon de Esperanto, oni povas konstati kelkajn vere ĝojigan rezultojn. Antaŭ ol apreci ilin, jen citaĵo el la enkonduka parto de ĉi tiu artikolo: „La instruado necesigas lernilojn kaj instruistojn; por la formado de instruistoj necesas supera instruado, por kiu necesas scienca bazo”. Kio okazis do en la lastaj unu-du jardekoj ĉi-terene?

Promesplenaj instrukondiĉoj

Ne eblas trotaksi la signifon de la instruista retejo *Edukado.net*, kiu funkcias kvazaŭ centra subtena servo por instruistoj kaj instruantoj (Kováts 2007). Daŭre plimultiĝantaj instrumaterialoj, informoj, retaj kontaktoj ktp. donas veran helpon al pli kohera kaj pli altnivela instruado de Esperanto.

Rezulte de saĝa kaj progresiga decido kaj diligenta laboro la planado de instruprogramoj kaj la pritakso de lingvaj konoj fareblas ankaŭ ĉe Esperanto laŭ *La Komuna Eŭropa Referenckadro* (Corsetti 2007, Kovács 2007). „Estas grave, ke ankaŭ por Esperanto estu uzataj tiuj ĉi principoj laŭ la rekomendoj de la Konsilio de Eŭropo kaj ni havu internacian lingvoekzamenon de Esperanto, kiu konformas al ties postuloj” (Kóródy 2008a).

La statistika realo

Kio estas direbla pri la efektiva instruado de Esperanto? Laŭ – verŝajne ne kompletaj – statistikoj (Pirlot 2008) la instruado de Esperanto efektiviĝas en malmultaj baz- kaj mezlernejoj en la mondo. Komence de 2009 ilia nombro kune kun estas iom pli ol 70. Koncerne la bazlernejojn tamen meritas specialan atenton la brita projekto *Lingvolanĉilo (Springboard to Languages)* (Kelso kaj Tellier 2008), antaŭ ĉio, ĉar ĝia ellaboro rilatis al aperinta socia (eduka) problemo. La faro de la iniciatintoj estas ekzemplodona. Laŭ alia vidpunkto havas signifon la lernejoj en Afriko. Cetere, kadre de diversaj projektoj inter kelkaj lernejoj, en kiuj oni faras la instruon de Esperanto, efektiviĝis ankaŭ internaciaj kontaktoj kaj kunlaboradoj.

La nombro de altlernejoj kaj universitatoj, en kiuj ekzistas Esperanto-kursoj, ankaŭ estas iom pli ol 70. Ĝenerale temas pri kursoj kun 25-65 studhoroj. El inter ili kelkaj kursoj estas enkonduko al interlingvistiko, respektive esperantologio aŭ historio de Esperanto. Instruado kun pli altaj studhoroj efektiviĝas nur en kelkaj universitatoj (aŭ altlernejoj). nome en kiu Esperanto kaj interlingvistiko estas deviga parto de la studadprogramo (Internacia Universitato, Karlovo, Bulgario) (Pirlot 2008), respektive en kiu la instruado de interlingvistiko efektiviĝas kadre de postdiploma instruado (Universitato de Adam Mickiewicz, Poznań, Pollando) (Koutny 2008a,b), plue ankaŭ en kiuj oni faras fakinstruadon tute aŭ iomgrade en Esperanto (Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, Klerigejo de la Internacia Akademio de Sciencoj, Bydgoszcz, Pollando (Grzębowski 2006, Casqueo 2007); Moskva Ŝtata Industria Universitato (fako Energimaŝinkonstruado), Moskva, Rusio) (Pirlot 2008).

Formado de instrukapabloj

Formi kaj pluformi instrukapablon jam fariĝis diversnivelaj studformoj.

Junulojn, kiuj volas instrui Esperanton, preparigas la Flugiloj-seminarioj (*Flugiloj de Malfacila Vento; Gvidu la Flugilojn*) (Kóródy 2007, Gonĉarova 2007).

En Liaoning-provinco (Ĉinio) oni disvastigas Esperanton laŭ zorge planita, impona laboro. Kadre de tiu laboro oni sukcese efektivigis la trejnadon de lingvoinstruistoj por sufiĉe multaj altlernejoj (Wu 2007).

Unujara instruista trejnado ebligas akiri instruistan diplomon de ILEI en la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań (Kóródy 2008b).

Ekde pli ol dek jaroj funkcias la Interlingvistikaj Studoj en la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań. Dum la trijara postdiploma studado la partoprenantoj alproprigas sciencajn, nome interlingvistikajn, esperantologiajn kaj komunikadajn konojn. (Koutny 2008a,b). Tiuj ĉi konoj ligas Esperanton al la scienca mondo. La Interlingvistikaj Studoj gardas kaj pluevoluigas rezultojn, kiujn ĉi-terene disvolvis István Szerdahelyi. Tiu fakto parolas per si mem.

Ankoraŭ estas la unika historio de Herzberg, la Esperanto-urbo (Herzberg am Harz). Plurjardeka intensiva kaj malferma esperantista informagado estigis malferman sintenon al Esperanto ĉe la loka loĝantaro kaj politikistoj. Longdaŭra instruado de Esperanto formis klerigan centron en la urbo. Ambaŭ rezultoj donis bazon por la unuanima decido de la urba konsilantaro, ke la urbo ricevu oficiale la kromnomon „Herzberg – la Esperanto-urbo“. Krome, Esperanto estas pontolingvo por la ĝemelurbaj kontaktoj inter la germana urbo Herzberg kaj la pola urbo Góra. La Interkultura Centro en Herzberg estas signifa kleriga fortikaĵo de Esperanto, kie oni instruas ne nur Esperanton, sed oni ankaŭ trejnas instruistojn por Esperanto (Zilvar 2007). Herzberg estas imitinda ekzemplo.

Aktuala iniciato

Pri konferenco, kiun organizis Wim Jansen en Amsterdam, raportis la revuo Esperanto, interalie, la sekvan: „Ĝuste antaŭ la UK en Roterdamo kunvenis universitatoj kiuj instruas interlingvistikon aŭ Esperanton, sub la aŭspicio kaj subteno de Esperantic Studies Foundation. Partoprenis 50 homoj el 23 landoj sur kvar kontinentoj, reprezentantaj 37 universitatojn aŭ similajn instituciojn. *Ni volas eviti la forfalon de Budapeŝto eble pro neatentigo* deklaris Humphrey Tonkin. [...]. Ankoraŭ bedaŭrindas la ĉeso de la historie grava instruado de Esperantologio en la universitato ELTE, iniciatita de István Szerdahelyi en Budapeŝto, kiu okazis pro manko de taŭga teamo kiu scipovas daŭrigi la katedron kaj adapti ĝin al la Bolonja Procezo [...]. Tio stimulis la starigon de pli proksimaj kontaktoj kun universitatoj kiuj sin okupas pri tiuj temoj, kunvenigante ilin en la sama loko por du tagoj.” (Gobbo 2008) La konferenco, la unua rilate la supran celon, eble pruvigis komenco de promesplena kunlabora procezo.

Agemaj junaj talentuloj

La *Esperanto kaj Interreto* (E@I) – nomo estas tre trafa, la esencon koncize prezentanta, kiun portas la – iniciatema kaj tre fervora – memstara internacia neregistara junulara organizo. Pri ĝia destino la kerna teamo deklaris la jenan: „TTT uzatas per esperantistoj por ĉiuj kampoj de la UEA-strategio: informado, instruado kaj utiligado. Por ke tio okazu kvalite, plurflanke kaj samtempe »facile kaj rapide«, ekestis la organizo E@I” (La kerna teamo 2008). Konsidere la plenumitajn kaj pretiĝantajn retajn kaj eksterretajn projektojn de tiu junulara organizo la bildo estas tre impona kaj ĝojiga. Kelkaj el tiuj projektoj precipe indas substrekon kaj pritakson.

Havas grandan signifon la paĝaro *lernu.net*, kiu ebligas malĉeeste partopreni multlingvan Esperanto-kurson. Ĝian sukcesan funkciadon pruvis ekzemple la unua *lernu!*-renkontiĝo en 2008. En kiu renkontiĝis 105 *lernu*-lernantoj el 25 landoj. Kaj kiuj ne povis partopreni – supozeble estis pli multaj (Baláž kaj Gaus 2008).

Ĝenerala manko estas, ke pri la vere buntaj kaj eventoplenaj Esperanto-aranĝoj tre-tre malmultaj informoj atingas la eksteran sociomedion. Eble la suba projekto helpas malpligrandigi tiun mankon:

„**www.aktuale.info**: baldaŭ konstruota paĝaro kun buntaj kaj diversspecaj informoj pri Esperanto kaj la E-movado. Ĝia nomo estos »Esperanto aktuale« kaj ĝia ĉefa celo estos krei multlingvan informportalon kun la celo informi (ĉefe) eksteran publikon pri okazaĵoj en la movado kaj pri interesoj de Esperanto-parolantoj. Aldona celo de tiu projekto estas kunligo de fortoj de esperantistoj por pli efika informado al ekstera publiko. La informado pri okazaĵoj en la »Esperanto-mondo« al la ekstera publiko (al neesperantistoj) okazas relative malofte. Tre ofte eĉ la esperantistoj mem ne scias, kio okazas en najbaraj landoj. Tial E@I komencas konstrui flekseblan, facile uzeblan paĝaron, kiu servu por Esperantio kiel efika amaskomunikila inform-agentejo. La projekton (same kiel kelkajn aliajn, ekz. *lernu.net*) finance subtenas la usona fondaĵo *Esperantic Studies Foundation*” (La kerna teamo 2008).

Estiĝos grandioza eblo por plibonigi la eksterdirektan informadon, se laŭ la celoj efektiviĝos tiu ĉi projekto, kaj ĝi ricevos daŭran subtenon de esperantistoj el ĉiuj kontinentoj. Unuflanke per daŭra livero de aktualaj novaĵoj, aliflanke per atentoveko al la paĝaro en la ekstera sociomedio.

Ceteraj interesaj ebloj per interreto

El la diversaj ebloj donitaj de interreto indas mencion la *Vikipedio*, la plurlingva enciklopedio. La esperantlingva varianto, se ĝin sisteme evoluigos esperantistoj, estos ne nur bone uzebla informfonto por multaj, sed ĝi povos fortigi la prestiĝon de Esperanto.

Lastatempe aperis ebloj por partopreni en voĉdonado. Unu eblo estis sur usona retpaĝaro *change.org/ideas*, kie oni povis voĉdoni por la propono, ke en Usono Esperanton oni enkonduku en la lernejojn. Esperantistoj el la mondo (precipe el Eŭropo) preskaŭ pasie partoprenis en la voĉdonado, kaj la rezulto iĝis konsiderinda. La voĉdonadon akompanis multe da komentoj, kiuj entute donis multflankajn argumentojn por Esperanto.

Alian eblon por partopreni voĉdonadon organizis sendependaj eŭropaj organizoj. Por membroŝtatoj oni kreis retpaĝon por doni proponojn kaj voĉdoni. Esperantistoj ankaŭ ĉi-kaze montris diligentecon, sed la rezulto estas, pro la interdiviteco, malfacile travidebla.

Kion pensi pri tiaj ebloj? Ili sendube donas okazon fari argumentadon por Esperanto. Aliflanke temas pri eventualaj ebloj, sekve la influoj supozeble ne estos longdaŭraj.

Konkludo

Homoj lernas Esperanton ne nur en diversgradaj lernejoj, sed ankaŭ – aŭ plie – en kursoj organizitaj de Esperanto-organizoj, aŭ ĉe privataj instruistoj ktp. Pri tio statistiko estas nekonata. Surbaze de la supre prezentitaj faktoj bone videblas, ke la Esperanto-parolantaro bone kaj favore akomodiĝis al la interretaj ebloj kaj cirkonstancoj. La evoluo precipe estas signifa sur la kampo de instrumaterialoj kaj instrumetodoj. Tio estas bona antaŭkondiĉo por la plia disvolviĝo de Esperanto, se por tiu ankaŭ ceteraj kondiĉoj formiĝos favore.

Por atingi signifajn rezultojn, krom talentaj agantoj, necesas ankaŭ financaj rimedoj. Pro tio ni nepre devas emfazi la tre signifan, nemalhaveblan rolon de la fondaĵo *Esperantic Studies Foundation*.

La elstaraj kaj la daŭraj atingaĵoj ligiĝas al nomoj de talentaj esperantistoj kaj grupetoj konsistantaj el tiaj homoj. Por ke la atingitaj rezultoj restu longtempaj oni devas zorgi ankaŭ pri ties homaj kondiĉoj, nome pri disĉiploj. Tiel István Szerdahelyi edukis disĉiplojn, el kiuj ne nur unu estas talenta kaj fervora motoro de la Esperanto-afero, inter alie en la supre emfazitaj agadoj.

Por karakterizi la nunan bildon per unu frazo: interne de la Esperanto-mondo la esperantistaro estas agema kaj sufiĉe sukcesa, sed por tio, ke ĝi scipovu bonrezulte efiki ankaŭ eksteren, ĝi ankoraŭ ne trovis taŭgan metodon.

Skuita mondo

En la Eŭropa Unio Esperanto principe estus bezona kaj el ekonomiaj kaj el politikaj vidpunktoj. Se ĝia uzado estus oficiale subtenata, tio rapidigus la disvastigon de Esperanto en ĉiu mondparto, ĉar la komunikado en la ekonomiaj, komercaj, turismaj ktp. kontaktoj estus pli facila, pli malmultekosta. Tamen la Eŭropa Unio, almenau nun, sekvas ne racian, sed emocian kaj konservativan lingvopolitikon.

Nun estas tute ne videble, ke post la nunaj fortaj financa kaj ekonomia krizoj kiuj estos la sukcesaj landoj kaj mondpartoj, kaj ke ili kiajn lingvopolitikojn kredos laŭcelaj. La plifortiĝo de la mondekonomia rolo, ekzemple, ĉe Ĉinio, Japanio, Sud-Ameriko eble povos formi pli favoran lingvopolitikon ol kiaj estas la nunaj lingvopolitikoj.

La ŝanco de Esperanto – laŭ persona opinio

En la jaro 1999 d-ro Tazio Carlevaro esprimis siajn dubojn pri la sorto de Esperanto en sia artikolo '*Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045?*' La respondo kontraŭ tiuj duboj, ankoraŭ nuntempe ne povas esti alia ol tiu estis tiamtempe: „Unue, la vivo, la ekzistado de Esperanto kaj la grado de ĝia disvastiĝo estas du malsamaj aferoj. La favoraj ecoj de Esperanto motivos homojn por eklerni kaj uzi ĝin antaŭ 2045 kaj antaŭ poste. Esperanto kontentigas ekzistantajn homajn bezonojn kaj servas homajn interesojn. Tio ne dependas de tio, ĉu la »fina venko« havas ŝancon aŭ ne, ĉu la angla estos mondlingvo aŭ ne. Tute alia demando estas tio, ke en iu tempo kaj en iu loko la bezonoj je Esperanto en kiuj kaj kiom vastaj homaj rondoj estiĝas. Tio dependas de multaj faktoroj. La pritraktado aŭ debato pri la dependeco [de faktoroj] havas sencon, sed ne la malapero de Esperanto.” (Eŭropa Bulteno n-ro 2, la 12an de Decembro 1999) Tion mi pensas ankaŭ nun. Tial en la artikolo ĉefe temis pri faktoroj, kiuj influas kaj povos influi la disvastigon kaj disvastiĝon, alivorte: la ŝancojn de Esperanto.

Budapeŝto, 2009 februaro

Notoj

1. La laborgrupo formiĝis en 1989. En 1994 ĝi konsistis el Michael Cwik, Hans Erasmus, Grégoire Maertens, Giovanni Martinetto, Edward Symoens kaj Kristin Tytgat. (Erasmus 1994; 1. piednoto). Rimarko de L.G.: El tiuj personoj konsistis la t. n. kerlaborgrupo (aŭ Brusela Laborgrupo), ĉirkaŭ kiu ariĝis aktivuloj el diversaj landoj kaj landaj asocioj.

2. La agadon de la diverslandaj aktivuloj kunordigis Germain Pirlot.

3. „Nome de la Komisiono, lastatempe (17 majo, resp. 31 majo 1995) Edith Cresson respondis negative al la demandoj de eŭro-parlamentanoj Marie-Paule Kesteljin-Sierens kaj Marianne Thyssen, ambaŭ pri eksperimentj instruprojektoj de Esperanto. Cresson argumentis ke la tasko de la Komisiono estas »subteni la lingvojn kaj kulturojn de la membroŝtatoj«, ne Esperanton, ĉar al ĝi »mankas la kultura kaj historia riĉeco de natura lingvo«. Laŭ ŝi »la Komisiono opinias ke la uzo de neŭtrala lingvo povus konduki al ia perdo de tradicio kaj identeco«. – (Bonino 1996).

Michel Barnier komitatano respondis mondrete la 5-an de junio 2000 interalie: „Kiel mi jam diris, nia celo estas proksimigi Eŭropon al ties civitanoj, kaj mi dubas, ke uzado de morta lingvo estus pozitiva paŝo en tiu direkto.“

„Bazo por kompreno de aliaj kulturoj estas la lernado de tiuj lingvoj, sur kiuj tiuj lingvoj esprimiĝis; pro tio la Komisiono ne subtenas uzadon de artefaritaj lingvoj, ĉar ili, sekve el siaj esencoj, ne havas kulturan fonon.“ Piednoto en komisiona dokumento COM (2005) 596 definitiva. – Ktp.

4. „En signifa parto de la mondo, kaj precipe en Eŭropo, [...] estas unusenca la rolo de la angla kiel peranta lingvo. Ĉi tiun tendencon oni devas sciiĝi, kaj validigi en nia instruado, ke la hungaraj publika kaj supera instruadoj kvalifiku fakulojn, kiuj kapablas komuniki ageme partoprenonte en la internaciaj ekonomia, komerca kaj scienca vivo.“ El respondo (27.769/2002-2) de la Hungara Eduka Ministerio.

5. Partoj el intervjuo kun Zsolt Rostoványi universitata profesoro: „Iuj historiistoj rimarkas, ke en Eŭropo la ĉefa interrompa linio etendiĝas tute ne inter landoj sed tra respektive en ili. Ni trovas ĉe la unu flanko la transnacion eliton, kiu reprezentas la karakterizan eŭropecon, kies anojn kunligas la komuna lingvo, antaŭe la latina, poste la franca kaj nun la angla, krome la evento de la tuta movlibereco. Temas pri tiuj politikistoj, bankieroj, sciencistoj, kvalifikitaj inĝenieroj, kiuj vere sentas sin eŭropanoj, ja ili estas hejme ĉie en Eŭropo. El certa vidpunkto en ĉi tiuj mondcivitanoj estas pli da komunaj ecoj ol kiom ligas ilin al siaj malpli kulturitaj samlandanoj parolantaj nur la gepatran lingvon. Verdire ili estas la plej engaĝiĝintaj al la eŭropa integriĝa procezo.“ *Népszabadság*, 2000. júnio 3.

Referencoj/Bibliografio

- Bakan, Joel (2004): The Corporation. Beteges hajsza a pénz és hatalom után [Malsana klopodego por mono kaj potenco], Független Média Kiadó. La originala eldono: Joel Bakan: The Corporation, 2004. Constable & Robinson Ltd. London
- Baláž, Peter kaj Gaus, Jevgenij (2008): Sukcesa somera lernejo kun la unua *lernu!*-renkontiĝo, *Esperanto* oktobro 2008. 213
- Bonino, Emma (1996): Ni klare antaŭvidu la politikan vojon (Intervjuo). *Esperanto* marto 1996. 42-44
- Casquero, Augusto (2007): Studadsesio en la pola Bydgoszcz. *Esperanto* majo 2007. 117
- Corsetti, Renato (1995): Letero al Hans Erasmus, 1995-08-17
- Corsetti, Renato (2007): La Komuna Eŭropa Referenckadro. *Esperanto* marto 2007. 56
- Erasmus, Hans (1994): Nek disvastigi nek disvolvi, sed ... *Esperanto* junio 1994. 104-105
- Erasmus, Hans (1997): Al la membroj de la kernlaborgrupo pri la Lingvoproblemo en Eŭropa Unio. (Cirkulero) 10-09-1997
- Gobbo, Federico (2008): La neceso reinventi Budapeŝton. *Esperanto* oktobro 2008. 206-207
- Gončarova, Irina (2007): La 1-a trejnado „ Gvidu la 'Flugilojn'!“ *Internacia Pedagogia Revuo* 07/2, 15-17
- Grin, François (2005): L'enseignement des langues étrangères comme politique publique. RAPPORT ÉTABLI À LA DEMANDE DU HAUT CONSEIL DE L'ÉVALUATION DE L'ÉCOLE. <http://enotero.free.fr/rapportgrin.doc> / Fremdlingvo-instruado kiel publika politiko. Raporto verkita je la peto de la Alta Konsilio pri Taksado de la Instrusistemo. (Sintezo kaj rekomendoj). <http://www.uea.org/vikio/GRIN00sintezo>
- Grzębowski, Andrzej (2006): En Pollando studas esperantistoj el 22 landoj. *Esperanto* julio-aŭgusto 2006. 165
- Haszpra, Ottó (2003): Language policy principles for the EU for promoting language learning and linguistic diversity in a non-discriminatory and most economical way. Soumission écrite au Symposium «What Language Policies for the European Union», Bruxelles, 6 mai 2003.
- Kelso, David – Tellier, Angela (2008): Projekto „Lingvolanĉilo“. *Internacia Pedagogia Revuo* 8/3, 4-8
- Kóródy, Zsófia (2007): Instrukapabligo: trejnseminario Flugiloj de malfacila vento. *Internacia Pedagogia Revuo* 07/2, 14-15
- Kóródy, Zsófia (2008a): Paŝoj al normigitaj lingvoekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa referenckadro. *Esperanto* majo 2008. 108
- Kóródy, Zsófia (2008b): Trejnado de Esperanto-instruistoj, kursgvidantoj. *Internacia Pedagogia Revuo* 08/4, 13-14
- Koutny, Ilona (2008a): Interlingvistikaj Studoj 10-jariĝas. *Esperanto* aprilo 2008. 80
- Koutny, Ilona (2008b): Nova jardeko de Interlingvistikaj Studoj en UAM. *Esperanto* 08/4, 12-13
- Kovács, Márta (2007): Forumo pri la Komuna Eŭropa Referenckadro. *Internacia Pedagogia Revuo* 07/2, 17
- Kováts, Katalin (2007): Ni salutas la kvinjaran paĝaron. (Intervjuo) *Esperanto* januaro 2007. 10-11
- La kerna teamo de E@I (2008): Esperanto en la Interreto: Kiel ĝi fartas? *Esperanto* junio 2008. 124-125
- Pirlot, Germain (1995): Letero al László Gados. 04.08.1995.
- Pirlot, Germain (2008): Esperanto-kursoj oficiale organizitaj. <http://egalite.freeweb.hu/listo/listindex.htm>

- Piron, Claude (1994): *Le défi des Langues*. Paris, L'Harmattan, 1994. *La lingva defio*. <http://www.translationdirectory.com/article1009.htm> , tradukis: Vilhelmo Lutermano
- Stocker, Frank (1995): Letero al Hans Erasmus, 10. Juni 1995.
- Stocker, Frank (1997): Letero al Germain Pirlot. 25.05.97.
- Stryhn Meyer, Jimmy (1996): Kelkaj pensoj pri la strategio sekvonta. (Cirkulero) 14.09.1996.
- Stryhn Meyer, Jimmy (1997): Al landaj asocioj en EU, la kernlaborgrupo kaj elektitaj aktivuloj kaj asocioj. (Cirkulero) 07.05.1997.
- Wu Guojiang (2007): Altlerneja E-agado en Liaoning-provinco de Ĉinio. *Internacia Pedagogia Revuo* `7/3, 10-13
- Zilvar, Peter (2007): Herzberg, la Esperanto-urbo. (Intervjuo). *Esperanto* januaro 2007. 4-5
